

V - 1943/31

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Januari 1943

31 årg. Nr 1

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## Pensoj en novjartago.

Ni staras je la komenco de nova jaro. Novjartago vekas esperon sed ankaŭ maltrankvilon. "Kia aspektos nia mondo en la venonta novjartago?" oni demandas sin, kaj ni sendube povas respondi: "Ho, daŭras longa tempo ĝis tiam, kaj dum longa tempo ni povas fari multon."

En la nuna novjartago tia malserioza respondo ne same facile glitas trans niajn lipojn. Oni ne kuraĝas kredi, ankoraŭ malpli eldiri, ke io fariĝos tiel aŭ tiel depende de nia propra faro. Ĉiuj malbonaj potencoj en la tuta mondo estas liberigitaj kaj de ili dependas, kia aspektos la mondo venontan novjartagon.

La espero tamen ne lasas sin forĉasi per tiaj malgajaj meditoj, sed diras ĉiam, ĉiam: antaŭ venonta novjaro ni havos pacon. Oni sumas amason da observaĵoj, kiujn oni kredas ĉerpi el la konfuzaj militelegramoj, kaj ripetatas al si, ke la milito ne povas daŭri ankoraŭ unu jaron.

Ekzistas ja cetere nur du eblecoj: aŭ la milito finiĝos tiun ĉi jaron, aŭ ĝi ne finiĝos. Kiam la esperantisto ripetatas al si tiun iom naivan verdiron li devas konfesi ke ambaŭ eblecoj sugestatas al li timon.

Se la milito daŭros, li vidos siajn interrilatojn kun fremdaj landoj ankoraŭ pli limigitaj kaj pli malbonaj kaj li vidas la aron da samideanoj pli kaj pli malkreski. Li vere havas kaŭzon esti maltrankvila.


Se la milito finiĝos, ĉu tiam la limoj disfalos sammaniere kiel okazis post la mondmilito? Kaj se tiel okazos, ĉu la esperantistoj estos sufiĉe multaj kaj sufiĉe lertaj por povi plenumi la postulojn, kiuj tiam prezentos sin al nia lingvo kaj al nia movado?

Alveninte tien en siaj maltrankvilaj pensoj li rimarkas, ke ekzistas ankoraŭ unu tria ebleco: La milito povas finiĝi, sed la limoj eble daŭre estos fermitaj kaj baritaj. La ondo de gajaj esperoj pri internacia kunlaboro, kiu elfluis sur la teron post la fino de la antaŭa mondmilito, eble tute ne venos, kiam la nuna milito iam finiĝos. Tiam eble restos nur malfido inter la diversaj popoloj, kaj eble fremdulo ĉiam estos rigardata kiel malamiko. — La mano sur la koro, neŭtrala amiko, kion vi morkaŭ emas

montri al fremdulo el tio, kion ni havas ĉi-hejme, el tio kion ni faris aŭ intencas fari . . .

"La tria ebleco" ne estas nura ĥimero. Ĝi povas esti same vera kiel ĝi estas terura. Ĝi metus sur la internacian vivon perfortan jakon, ja, alispecan tian ol tiu vivo nun devis meti sur sin, sed veston, kiu premus des pli multe, ĉar oni ne povus kompreni ĝian celon. Oni ja devus kredi, ke ĝi fine, iom post iom, sed ho, kiel malrapide, plivastigus kaj fariĝus ordinara vesto. Iam, en la tempo de niaj infanoj aŭ nepoj ĝi povus permesi ke oni etendas bonvenigan manon al translimaj homoj.

Nu, diras la nekuracebla esperantisto-optimisto, do ni ja havus taskon en tia estonteco, eble la saman kiel nun, nome plejeble rapide ŝanĝi la perfortan jakon al komforta vesto. Ni ne revas pri tio, ke ni povas forigi la grandan barilon kiu malfaciligas la kunlaboron inter popoloj — la malsamajn lingvojn — sed ni scias ke ni havas la ŝlosilon al la pordoj kiuj je ĉiu lingvobaro kondukas preter tiun barilon. Tiu trezoro — tiu ŝlosilo — ne estu kaŝita kaj ne rustu! Ni tenu ĝin polurita kaj brila kaj ĉiam preta por esti al la dispono. En malbona kiel en bona tempo.



La sindiko kun familio plus eksteruleto.

## Publika letero al kompetentulo.

Dum pasintaj pacaj jaroj mi multfoje havis okazon buŝe uzi esperanton, interparolante kun francoj, germanoj kaj ĉeĥoj. Do mi konstatis, ke la lingvo povas bone funkcii kiel interkomprenilo.

Kiel literatura lingvo tamen, almenaŭ laŭ mia modesta opinio, esperanto ne estas tro fanfaroninda. Ĝa estas bedaŭrinda fakto, ke nuntempe ne tro multaj eksterlandaj esperantogazetoj atingas nian landon, sed tiuj, kiujn mi havas okazon trafolumi, ordinare uzas lingvon tre malklarajn. Same ankaŭ la plej multaj esperantaj libroj, kiujn mi vidis. Multajn nesukcesajn provojn mi faris, legi modernan esperantan libron. Mi devas konfesi, ke mi ne kapablis. La lingvo abundegas de neologismoj, nacilingvaĵoj, komplikita kaj malfacile komprenebla esprimmaniero kaj tiel plu. Sed tio ja ne estas kulpo de la lingvo. Estas la verkistoj kiuj meritas riproĉojn. Cetero ofte ekzistas svedlingva traduko de pli alta kvalito ol esperanta fuŝaĵo. Komparu ekz. la tradukon de Edv. Lidforss "Don Quijote" kun la kripligaĵo "Don Kihoto en Barcelono". Kompreneble la lasta nur estas sola ĉapitro, sed tiu, kiu iomete volas koni la pensmanieron de Cervantes, havas pli grandan utilon de la sveda traduko. Ĝam antaŭe mi volas diri, ke mi, kiam mi kritikis la tradukistojn, ne rilatas la svedajn. Kontraŭe mi opinias ke la elsvedigitaj verkaĵoj ordinare estas tre bonaj, ekz. "Sveda Antologio", "Gösta Berling" kaj aliaj. Tiel almenaŭ ŝajnas al mi. Sed eble tio dependas je tio, ke mi kiel svedo, ne rimarkas eventualajn "svedismojn" en la lingvo. Plue mi estas edukita en sveda kulturo kaj sveda pensmaniero, do mi certe ekhavis impresojn de nialanda popolanimo. Eble estas tiel, ke mi legas "peŝ svedaj okuloj", ĉar la nomitaj libroj ŝajnas bonaj al mi? Se eksterlandulo, kiu nur scias sian gepatran lingvon kaj esperanton, legus la librojn, ĉu ankaŭ li opinius la librojn facilkompreneblaj?

Mi ne volas kveruli, kiam mi starigas la demandon: "Ĉu necesas malfaciligi esperanton?" Facile oni lernas la dek ses regulojn. La vortojn oficialajn oni ankaŭ sufiĉe baldaŭ povas enkapigi. Kaj post tio oni, almenaŭ laŭ la reklamo, posedas la lingvon. Se oni tamen malfermas esperantan libron nuntempan, oni tuj ekdubas, ĉu la teksto estas esperanto aŭ alia lingvo. La esperantaj libroj, skribitaj antaŭ 20—30 jaroj, estas klaraj kaj facilkompreneblaj. Mi tute ne estas lingvosciulo, sed kompetentulo certe povas respondi je mia demando: "Ĉu ni devos sperti ke la esperanta lingvo disfalos en dialektojn?" Multfoje oni deklaris, ke tio estas nepensebla afero, sed... Ĉiaokaze necesas kiel eble plej baldaŭ reiri al la uzado de la esperanta lingvo, uzita de Doktoro Zamenhof kaj aliaj pioniroj. Estas danĝero en prokrasto!

M a l g r a n d e g u l o .

Ĉi-supran leteron ni sendis al kompetentulo, kaj, jen lia respondo.

"Skribi en Esperanto! Ridinde facila afero!  
Sed skribi internacie..."

Julie Šupichová en  
Samideana Vortaro.

Ne ĉiu homo estas majstro en traktado de lingvo; tio valoras rilate al Esperanto kaj al la gepatra lingvo. Sendube multaj svedoj legadas nun kun vera peno svedajn artikolojn en svedaj gazetoj, pro tio ke la verkistoj ne scias uzi la lingvon en populara maniero, ne scias uzi la oportunajn vortojn, kiujn komprenas la legantoj. Tiun uzon de la lingvo, nomata komuna al verkanto kaj leganto, ni tamen ne karakterizas kiel "dialekton". Oni uzas multe — tro multe — da fremdaj vortoj. Speciale svedoj opinias, ke enmiksado de multaj fremdaj vortoj estas signo de klereco. La vero tamen estas tute mala: skribi simple kaj klare per facile kompreneblaj vortoj estas arto, kaj arto ofte tre malfacila, kiu postulas de la verkanto pripensadon kaj kleron kaj spritecon.

Se ĉiu esperantisto scias kaj komprenas, ke la universala vortaro de Zamenhof, parto de la Fundamento de Esperanto, estas kaj restas la ĉefaj, la fundamentaj vor-

## Ĉiutaga mallonga filmo.

Kie vi estas?

Estas dolĉa sento povi iomete paŭzi. La korpo ekprenis la plej agrablan pozicion, kiun povas oferi la apogseĝo, kaj post kiam la cigaredo estas ekbruligita la dekstra mano faras la kutiman movon al la radio-radoj. Duonapatie la orelo perceptas la voĉon de la halo-viro: la posta disko ludos "Hungara Rapsodio n:ro 2" de Franz Liszt. La laŭtparolilo mi iom moderigas, kaj kvazaŭ de fora direkto oni aŭdas la unuajn pezajn akordojn de tiu rafinite muzikplena mikso de mola "puszt"-romantiko kaj sovaĝa "csárdás". Iom post iom, kun la transiro de la plorsingultaj arĉomovoj al sovaĝa "tokaja" ĝojo, mia intereso pli kaj pli grandiĝas.

La Liszt-a tonkreaĵo mem meritas tion, sed ekzistas ankaŭ io alia. Unue estas io difuza, io tre fora, sed pli kaj pli konturiĝas, ĝis subite vidiĝas antaŭ mi klara kaj evidenta la memoro de la hungaro, la esperantisto kaj amiko Tibor Czitrom.

Mi ekmemoras, ke vi kiel mezpunkto en intima rondo de esperantistoj amuzis nin rakontante gajajn historiojn, intersange de interesaj fragmentoj el via hejmlando Hungarujo. Iu en la rondo dume fingrumis la radion kaj ĝuste kiam vi konversaciis kun ni en la lingvo internacia, subite la bonkonataj tonoj de la Rapsodio n:ro 2 de Franz Liszt ekŝprucis el la laŭtparolilo. Je via: "Silentu!" ĉiuj ĉesis paroli, kaj oni aŭdis nur la muzikon. Kun la sama devocio, kun kiu vi kutimas aŭskulti la hungaran naci-himnon, vi momenton staris senmove, poste vi komencis zumi akompane al la instigaj tonkaskadoj, kaj se vi ne estus retenita pro la konvencio, ni sendube estus ankaŭ vidintaj veran hungaran "csárdás".

Vi certe sentis konsolon en tio ke vi povis pere de la tonkreaĵo de via samlandano veturi tra la etero sur la flugiloj de la penso al la sunkaresita hungara stepo kaj la arda sunlumo — precipe ĉar la termometro sur la stratoj en Öbacka en la jaro 1934 de nia Sinjoro obstine tenis sin sub la 20-streko.

Kiel vi miris pri la honesteco de la svedoj! La epizodo ĉe la fervojstacio — vi kredis, ke ĉiu homo estas ŝtelisto, kiu volas kapti vian pakadon — amuzis nin tutkore. Same via miro pri la legemo inter la svedoj: ŝajnis al vi kvazaŭ ĉiu familio posedas bibliotekon, en la urboj kiel sur la kamparo. Ni do komprenis, ke vi kaj viaj samlandanoj havis neklarajn konceptojn pri nia lando kaj popolo, sed ke por vi estos kara devo je via hejmvieno ĵeti lumon sur tian ide-konfuziĝon.

Antaŭ ol ekflamis por la dua fojo la granda mondbrolo, vi forlasis nian Svedujon. Post tiam la sciigoj pri vi estis sporadaj kaj fine tute ĉesis. La "puszta"-n ne plu balaas romantikaj facilventoj: la gajaj ridoj el la vintrinkejoj kaj la instiga salt-ritmo de "csárdás" dronas en la centoble pli forta tondro de la motorigitaj ŝtormbirdoj, kiuj senmalhelpe en diversaj direktoj preterpasas la murojn, al kiuj iam la frunto de mongolhordoj batigis sanganta.

La violono de la cigano-direktisto ne plu estas la sola kordo, kiu plorsingultas... Eble vi fariĝis unu el la granda orkestro, kies "hungaraj rapsodioj" kelkfoje atingas nian oreton en la formo de mallongaj, sekaj telegrafkomunikaĵoj. Kie vi estas?

G u s t a v u s .

(El Västernorrlands Allehanda.)

toj de nia lingvo, tiam li ankaŭ komprenos, ke verkante por internacia, por universala publiko li devas elekti dirmanierojn kaj vortojn, kiujn vere kaj facile komprenos tiu publiko. Tio estas same natura afero kiel ke, parolante al granda aŭdantaro en vasta loko, oni devas paroli per laŭta voĉo.

En venonta numero mi citos, kion Zamenhof skribis en "Lingvo Internacia" responde al simila plendo antaŭ jam kvardeko da jaroj.

P a u l N y l é n .

## NIA HEREDAĴO.

De Stellan Engholm.

En diversaj kampoj de homa agado oni demandas sin, kiel aspektos la vivo post la milito. Kiel funkcios regado, produktado kaj komerco en naciaj kaj internaciaj rilatoj, kiaj estos la kondiĉoj por kultura kaj scienca laboro? Generale oni atendas grandajn ŝanĝojn, ĉu en malbona direkto ĉu en bona. Unuanima opinio estas, ke la vivo post la milito estos tute alia ol antaŭ ĝi.

Multaj eminentuloj opinias kaj en kultura-sciencia kampo kaj en tiu de komerco-ekonomio, ke la libera interpopola kunlaboro estos tre limigita, multe pli malgranda ol antaŭ la milito. Ideologioj kaj doktrinoj kaj agad-principoj naskitaj el tiuj metos fortikajn barojn inter popolojn kaj grupojn de popoloj.

Ekzistas ankaŭ homoj, kiuj opinias, ke post la milito venos epoko de internacia demokratio kaj senfina paco.

La realo ofte fariĝas tute alia, ol oni antaŭe opiniis. Povos okazi tiel ankaŭ nun. Sed unu afero estas certa: kiam la milito estos finita, ni ne iros rekte en paradizon de paco kaj bona volo. Travivinte tian spiritan malsanon la homaro ne tuj staros freŝa kaj sana. Restos en la animoj multaj makuloj kaj vundoj, malfortiĝis aŭ detruigis ĉe multaj la principoj por normala homeca vivo. Kaj la kvalitoj de la individuoj aperos ankaŭ en la kolektiva vivo.

Kaj okazu kiuj ajn ŝanĝoj — en siaj esencaj kvalitoj la homoj restos samaj kiel pli frue, kun inerto kaj fervoro, kun inklinoj malbonaj kaj bonaj.

Por ni, anoj de la lingvo de Zamenhof, ekzistas nur unu ĉefa afero: daŭrigi nian laboron, daŭrigi hodiaŭ, daŭrigi morgaŭ, la mondo estu organizita en tiu aŭ alia maniero.

Unu jaron antaŭ la militeksplozo mi renkontis esperantiston, kiu diris: "Se oni vere fariĝis esperantisto, oni ankaŭ restas esperantisto, oni ne povas retiri sin." Li estus povinta aldoni, kaj estas tio, kio donas la plenan sencon al liaj vortoj: "— malgraŭ tio, ke nia movado tie ĉi estas malpermesita, ke ni ne rajtas uzi la lingvon kaj preskaŭ perdis kontakton kun alilandaj samideanoj."

Tiel estas. Se ni vere fariĝis esperantistoj, ni restas esperantistoj, malgraŭ ĉiuj ŝanĝoj. Por ni la postmilita tasko estas tute klara: daŭrigi nian laboron, okazu kio ajn. Ni havas grandan heredaĵon por administri kaj bone flegi.

Heredaĵon, jes. Esperanto ne estas kiel pli malpli banala filmo, kiun iu firmo ĵetis en la mondon por gajni monon, kaj kiun oni unu tagon vidas kaj la duan forĝas. Esperanto ne estas ŝocieta distro, al kiu oni en unu monato aliĝas kaj en la dua forlasas. Ekzistas homoj, kiuj kondukis kaj kondutas, kvazaŭ tiel estus, sed estas ili, kiuj eraras.

Unue ni havas la lingvon mem. Kian valoron ĝi havas, mi ne bezonas ripeti. Tiu valoro estas unika. Nia lingvo ŝajnas simpla afero, kiam oni supraĵe traktas ĝin, sed ju pli oni pensas pri ĝi, des pli mirakla ĝi ŝajnas en sia estiĝo kaj sia tuta vivo. Fakte ĝi estas unu el la plej miraklaj aferoj, kiuj estiĝis en la tuta nova tempo. Ĉu tian heredaĵon ni povas neglekti aŭ eĉ forlasi? Ho ne!

Due ni havas la skribaĵojn de Zamenhof, inter kiuj estas senkompare gravaj liaj kongresaj paroladoj kaj liaj poemoj. Simile al la lingvo tiuj verketoj ne ŝajnas speciale rimarkindaj al homo, kiu legas ilin sen multe da atento kaj sen profunde kompreni ilian sencon. Sed ju pli oni studas ilin, des pli mirindaj ili ŝajnas, kompareblaj al la spiritofortaj verkoj de profetoj kaj kredofondintoj, kompareblaj al la negrandaj sed gravegaj konstituciaj dokumentoj de mondogravaj nacioj.

En tiuj du aferoj, en la lingvo kaj en la verkoj de Zamenhof, ni havas fundamenton kaj programon por nia tuta movado, jes, por la tuta homaro. Nenion esencan nia movado dum sia ekzisto aldonis al tiu fundamento kaj tiu programo, nenio esenca estos aldonebla.

Trie ni havas nian tutan movadon kun evoluo de la lingvo kaj multaj atingoj en diversaj kampoj kaj antaŭ ĉio kun la samsento kaj komuna spirito de la tutmonda anaro.

Granda kaj unika estas nia heredaĵo. La heredaĵoj de la popolo estas hejma tero, komunaj rajtoj kaj kutimoj, komunaj interesoj, eĉ komunaj antaŭjuĝoj kaj komuna potenco super aliaj popoloj. Vere nia heredaĵo ne estas malpli grava. La plej esenca en ĝi, la moviga forto, estas

homeco kaj klopodo por pli kaj pli da homeco en la mondo.

Kaj kio estas pli bezonata kaj en la fundo de la koroj pli dezirata — sen konsidero al spirite malsanaj homoj, kiuj volas nur detrui — ol homeco. Plena respekto de homo por homo, nenies superrego super alia — tio estas simpla afero kaj tamen tiom granda, facile imagebla kaj tamen tiel pene atingebla.

La mallumo estas nun pli densa, ol kiam Zamenhof verkis "La vojon". Sed same rekta kaj klara kaj tre difinita estas nia vojo elektita. Kaj la samaj signoj validas por nia laboro: espero, obstino, pacienco. Estis facile teni esperon viva en jaroj pasintaj. Por teni ĝin viva nun ni devas meti obstinon kaj paciencon kiel la unuajn signojn.

Ke neni el ni forgesu la heredaĵon, kiu estas konfidita al ni! Ĝia signifo restu viva por ĉiuj!

Stellan Engholm.

## Tri svedoj kaj la skotoj.

El Verda Rapsodio ni tranĉis tiun humorplenan kaj internacie valoran instrukcion:

Tri svedoj pasigis sian libertempon en la ĉarma, angla universitata urbo Oxford kun skota sinjoro. Ĉar ili rimarkis, ke la skoto estas tre bonhumora kaj ŝatas bonan ŝercon, ili foje interkonsentis ŝerci kun li pri la laŭdira avaremo de la skotoj. Unu posttagmezon, kiam ili sidis kune, unu el la svedoj tre serioze diris: Du skotoj vetis pri kvin pencoj, kiu el ili povas resti plej longe sub la akvo. Ili subakviĝis, kaj post duonhoron ambaŭ revenis al la supraĵo — mortintaj. Antaŭ ol la skota sinjoro havis tempon diri, la dua svedo komencis: Foje skoto ekvidas kupran moneron sur la strato kaj ĵetas sin sur ĝin. Sed en la sama momento aŭtomobilo surveturas kaj mortigas lin. La ŝoforo estas akuzita, sed la tribunalo malkondamnas lin, ĉar laŭ ĝia opinio la skoto mortis per natura morto. Nun tria svedo mallaŭte kaj trankvile diris: Kiam anglo perdis siajn harojn, li aĉetas harelikŝiron. Kiam skoto fariĝas kalva, li forvendas siajn harbroson kaj kombilon.

Je tiu momento la skota sinjoro, kiu ĝis tiam silente aŭskultis, stariĝis kaj gaje diris: Karaj amikoj! Mi vidas ke vi fariĝis viktimoj de la eraro, ke ni skotoj estas avaraj. La vero estas, ke ni nur estas racie ŝparemaj. Sed eĉ tiu laŭdinda kvalito ne estas pli granda ol ke ĝi permesas al mi inviti vin al tagmango en mia hotelo. — Ĉu necesas diri, ke la tri svedoj ekmiris kaj ankaŭ hontis? Tamen ili danke akceptis la inviton.

Alian tagon la samaj tri svedoj estis kune kun iu alia bonhumora skota amiko kaj interkonsentis reripeti la ŝercon. Pro tio la unua diris: Skota elmigranto revenas el Ameriko post dudekjara foresto. Ĉe la haveno de la hejmurbo lin renkontas du viroj kun longaj barboj, kaj nur malfacile li povas konstati, ke estas liaj du pli junaj fratoj. Salutinte ilin li demandas: Kial vi portas tiajn barbojn? Unu el ili respondas: Stultulo, ĉar vi kunprenis la razilon, kiam vi forvojaĝis. — La dua svedo diris: En skota urbo oni intencis dungi novan policanon. Unu el la aspirantoj estis ekzamenata pri diversaj aferoj, kaj inter alie oni demandis lin, kiamaniere li agus, se li estus komisiata disigi homamasigon. Mi ĉirkaŭirus kun mia ĉapelo por kolekti monon, estis lia respondo. Li ricevis la oficon. — Kaj jen la tria svedo: Skoto atendis ĉe aŭtobusa haltejo en Londono. Kiam la buso alvenis, li demandis al la kondukto: Kiom kostas al la parlamentejo? Du pencojn, respondis la kondukto. Forveturu, diris la skoto kaj komencis postkuri la buson. Ĉe la sekvanta haltejo li senspire atingis la aŭtobuson kaj demandis: Kiom kostas de tie ĉi? Tri pencojn, estis la respondo, ĉar ni veturas en la kontraŭan direkton.

Je tiu momento la skota sinjoro, kiu ĝis tiam silente aŭskultis, stariĝis kaj gaje diris: Karaj amikoj! Viaj anekdotoj nur havas unu mankon. Mi jam aŭdis ilin en mia hejmlando, sed pri svedoj. Se vi volas pruvi, ke vi svedoj ne estas tiel avaraj, kiel ni skotoj kredas, vi nun havas konvenan okazon. — Kion fari? Kompreneble la tri svedoj estis devigataj inviti la skoton al luksa tagmango por savi la reputacion de sia nacio.

Karl Söderberg.

**BULTENO DE IEL N:ro 8.**

Novjarsalutoj 1943.

Rerigardante la lastan duonjaron 1942 mi konstatas ke pli kaj pli malofte alvenis kolombo kun letero el fremda lando. La kolomboj plejparte estas pafitaj, kaj la leteroj neskribitaj aŭ kaptitaj de la cenzuro.

Kiam mi do nun, okaze de la jarŝanĝo 1942—1943, faras al vi raporton pri la esperantista vivo tra la mondo, mi petas vin kompreni, ke tiu raporto enhavas nur etajn novaĵojn el la riĉa materialo, kiu abundas en la mondo sed momente kaŝita, tamen ne forgesita. Kiom da malfacilaĵoj melhelpas la esperantistojn! Kiom da penadoj!

Ekzemple por la norvegoj. Ĝis nun ili konstante eldonis sian gazeton. Sed laŭ dekreto ili ekde 1 januaro 1943 "provizore" pro papermanko ne rajtos plu presi sian organon. La norvega sekretario tamen diras: "Ni sentas tion kiel frapon, sed tute ne sufiĉas por forpreni de ni la kuraĝon! Ni alimaniere aranĝos la kontakton kun ĉiuj legantoj." Dum la aŭtuno la norvegoj eldonis broŝuron "La Esperanta studrondo" de Alf Hasle. Temas pri valora helpilo por gvidantoj de studrondoj. Jen: Antaŭen!

Saman impreson de persista optimismo donas la revuoj el Toulouse kaj Lyon. En la (ĝis nov.) libera parto de Francujo la esperantistoj daŭre laboris: kunvenis, ekskursis, aranĝis kursojn. Sed post la lasta frapo kontraŭ la franca popolo mi ricevis neniun vivsignon. Antaŭe mi tamen kun ĝojo akceptis karton de amiko Petit, la energia sekr. de la franca societo, en Parizo. Li kore salutas al ĉiuj amikoj kaj asertas, ke la francoj post la milito kun entuziasmo denove revenos al la kara laboro por Esperanto.

Gratulinda metamorfoso okazis en la lasta jaro, ĝuste dum la milito, al Svisa Esperanto-Societo. Kiam oni foliumas la svisan organon, oni ekhavas impreson pri asocio juna, energia, ideriĉa. Pli celkonscie ol iam antaŭe la organo prezentas al la membraro konsilojn, direktivojn, admonojn. Ankaŭ alimaniere la svisoj montras sian aktivecon. Ekz. antaŭ nur kelkaj monatoj aperis novaj ŝlosiloj Esperanto-german-lingvaj. Kaj en januaro 1943 oni eldonos korespondan kurson. Cetere oni komencis novan metodon por kontaktigi la grupojn kaj la svisan centran komitaton, nome per aranĝo de regionaj kongresoj kiam kolektiĝas proksime situataj kluboj sub gvido de unu el la komitatanoj. Tiaj kongresetoj jam okazis plurloke kun bona rezulto. La kuraĝa entreprenemo de la svisaj gvidantoj meritas plenan sukceson!

Plej interesa novaĵo el Svedlando estas, ke la nova koresponda kurso "Esperanta Studservo", kiu konsistas el sufiĉe malfacilaj traduktekstoj kaj celas prepari la kandidatojn por la supera Esperanto-ekzameno, dum la pasinta aŭtuno kolektis ne malpli ol 330 partoprenantojn el 140 diversaj lokoj tra la tuta lando. La vojaĝanta sindiko T. Morariu deĵoris dum la tuta jaro, vizitis la klubojn, faris amasojn da prelegoj kaj plivigligis la Esperanto-vivon.

Danujo liveris malmultajn novaĵojn dum la pasinta aŭtuno. Versajne la germana cenzuro konfiskis ĉiujn danajn esperanto-gazetojn. Tiom mi tamen estas informita, ke la nomita gazeto regule aperas, kaj ke la danaj kluboj tre aktive laboras kaj aranĝas multajn kursojn. D-ro Justesen ĵus skribis al mi, ke li ekŝiĝis kiel prezidanto de la Dana ligo, kaj ke la vicprezidanto, d-ro H. Ekerrup en Aarhus, nun funkcias kiel afergvidanto. Al d-ro Justesen mi prezentas varman dankon por ĉio, kion li malavare donis al nia movado! Certe li ankaŭ estonte konservos la kontakton kun Esperanto kaj je bezono disponigos al la movado siajn fortojn.

El Britujo amiko Goldsmith informas, ke la movado tie pli kaj pli progresas. IEL ankaŭ bone laboras. En oktobro aperis la dua parto de la jarlibro 1942. Krom kutimaj informoj pri la delegitaro ĝi enhavas tre interesan fakterminaron pri infan-ludoj. Tiu ideo, aldoni al ĉiu jarlibro fakterminaron pri speciala temo, estas eksterordinare saĝa. Tiamaniere ni pere de nia jarlibro post kelkaj jaroj havos plej valoran kolekton de fakterminaroj.

La usonaj esperantistoj jarkongresis en julio en Detroit. La programo estis valora, kaj la harmonio perfekta. S-ro Scherer ekŝiĝis kiel prezidanto de la usona asocio kaj novelektiĝis d-ro Cecil Stockard, Bradenton en Florida.

**LIBROJ — GAZETOJ**

kaj aliaj eldonaĵoj.

**VERDA RAPSODIO**, dudeksepnombra foliaro mimeografiita, inter flame verdaj kovriloj, jen la lasta, por la momento lasta kontribuo de la okcidentgatoj al la esperanta literaturo.

Kiam mankas pano oni manĝas torton, diras sveda proverbo, kaj kiam la ordinaraj eldonistoj ne kuraĝas fabriki novajn librojn, la kuraĝuloj en Borås kaj Skövde prezentas al ni belan, enhavoriĉan novelaron, intermiksiton de poemoj kaj eĉ drameto. Bona kristdonaco, bona, ĉar ĝi nur venis kelkajn tagojn post la festo kaj pro tio ne dronis en la donaco-amasoj.

Mi skribis poŝtkarton al s-ro S. A. Jacobson, Villagatan 3, Skövde, kaj ricevis post kelkaj tagoj poŝtrepagleton, kiu ŝtelis de mi tutan vesperon, kaj certe ŝtelos la verda enhavo de mi ankoraŭ kelkajn vesperojn!

Ni devas esti dankaj al niaj laboremaj esperantistoj de Västergötland. Kiam aliaj silentas kaj hezitas, ili laboras, rakontas kaj kantas, diru rakontigas kaj kantigas nin.

Eksterulo.

**7:50**

utgör medlemsavgiften för SEF under 1943 för direkt anslutna medlemmar (inkl. Svenska Esperanto-Tidningen). Föreningar erlägga en årsavgift av 2:— kr. pr medlem.

La novembra numero de la gazeto "Amerika esperantisto" cetere enhavas la interesan informon, ke nia konata propagandisto George A. Connor sukcesis aranĝi tiel, ke la granda revuo "Youth's Inter-American Bulletin", kiu ĝis nun enhavis paralelajn tekstojn en angla, hispana kaj portugala lingvoj, ekde novembro 1942 ankaŭ entenos la artikolojn en Esperanto. Bonega ideo!

Jen estas vivsignoj el kelkaj landoj! Mi ankaŭ volas transdoni saluton de s-ro Teo Jung, eksred. de Heroldo de Esperanto, kiu nuntempe laboras kiel oficisto. Li ne estas soldato, kiel flustris onidiro. Pastro Cseh kaj ges-oj Isbrücker ankaŭ fartas bone. Same s-ro Bugge-Poulsen en sia lando.

Oni havas la impreson, ke la milito nun jam transiris al la plej aktiva periodo, al la plej kriza — ni esperu al la lasta. Ke la nova jaro 1943, alportu la de ni ĉiuj sopiratan pacon! Ke la jaro 1943 ebligu al ni, gefratoj de la verda stelo, denove renkontiĝi kaj reciproke premi la manojn! Ke la jaro 1943 donu al la homaro feliĉon kaj harmonion!

Stockholm 1 januari 1943.

E. Malmgren.

**IEL:s årsböcker.**

IEL:s årsböcker, som ges ut regelbundet oavsett kriget, bli allt värdefullare. Sedan ett par år infogas nämligen i varje årsbok en ordlista över fackuttryck från ett visst område. Årsboken 1940 innehöll exempelvis "Armea terminaro", 1941 "Aeronaŭtika terminaro", 1942 "Terminaro por infanludoj". Första delen av årsboken 1943 beräknas komma med "Teknika terminaro" och andra delen med "Radia terminaro".

Härav framgår att IEL:s årsböcker komma att bilda ett värdefullt samlingsverk för alla, som önska ha till hands fackordböcker för olika yrken och ämnen.

Årsboken 1943, som utkommer i 2 delar, kostar endast 3 kr. Tillsammans med den internationella tidskriften "Esperanto Internacia" utgör priset 8 kr. Inbetalningsavgifterna om möjligt i januari till Cefdel. Karl Wästfelt, Cedergrens väg 27, Stockholm 32. Postgiro 15 12 88.

# SEIF Spalten.

## FRAN FÖRBUNDSKASSÖREN.

### Avgifterna.

Enligt beslut vid årsmötet i Borås utgår medlemsavgiften för direkt anslutna medlemmar under 1943 med 7:50 kr. Häri ingår prenumeration å tidningen, varför direktanslutna medlemmar icke böra prenumerera särskilt å tidningen. Likaledes enligt årsmötets beslut skall förening erlägga en årlig avgift av 2:— kr. för varje medlem. De gamla kvartalsavgifterna äro alltså slojade. Föreningarna böra insända helårsavgift till SEF före den 31 mars 1943. Avgifter för senare tillkommande medlemmar insändas så snart ske kan. Avgifterna insändas till SEF:s postgirokonto 2012. Sänd ej avgifter till förlagsföreningen.

### En julklapp till SEF.

Tills dato (26/12) har det influtit julgåvor till ett sammanlagt belopp av 200:— kr. Vi be att få framföra vårt hjärtligaste tack härför. Denna "insamling" avslutas med utgången av år 1942. Därefter kommer en av de första dagarna utlottning av en del bokpris att företagas. Antalet bokpris blir givetvis beroende på antalet givare. Fullständig redovisning för influtna medel samt uppgift på vilka som vunnit bokpris, kommer att publiceras i februariumret av denna tidning.

### Ombudsmannafonden (postgiro 20 12).

Alla hittills influtna medel till ombudsmannafonden äro nu förbrukade. Tyvärr ha flera bidragstecknare av en eller annan orsak underlåtit att utlösa de postförskott vi tillställt dem. C:a 50 st. postförskott ha sålunda återkommit outlösta. Därav ha 4 "vägrat" att utlösa dem och resten icke utlöst dem 'inom föreskriven tid'. Redovisning för ombudsmannafonden följer i nästa nummer.

Birger Gerdman.

**OMBUDSMANNEN** var på väg norrut, då vi i början av november 1942 lämnade honom. Red. Morariu uppehöll sig i Örebro den 8 november, i Eskilstuna 9—10 nov. och höll där tidigare avtalade skolföredrag, två i högre allm. läroverket och två i Elementarskolan för flickor. Resan gick sedan i ilmarscher över Sala och Krylbo till Falun där sju konferenser resulterade i avtal om föredrag under januari. Den 12 november ägnades Rättvik och Leksand och den 13 kunde kontrakt tecknas om föredrag i Krylbo.

Vid återkomsten till Örebro den 14 november hade ombudsmannen nöjet att se den av honom föreslagna esperantoutställningen ordnad av Örebroklubben.

Den 15 april gick resan söderut och den 16 återupptogs kurserna i Hälsingborg. Den livaktiga klubben i Halmstad fick besök den 18 november och föredrag hölls i Varberg följande dag. Ett givande besök hos göteborgarna den 19 november utsträcktes till den 21 november för konferens med redaktör Backlund om vinterkursen i Dals Långed 27—31 december och för två skolföredrag. Kurserna i Hälsingborg kallade emellertid, och ända till månadens slut uppehöll sig red. Morariu i Skåne med besök i Lund, Malmö, Åkarp, Klippan och Munka-Ljungby.

Den 2—3 december ägnades Kristianstad, där 2 föredrag och 2 provlektioner hölls, och den 4—5 december Hörby och Osbyholm. I Hörby hölls 3 föredrag i folkskolan. Den 6—8 fortsattes kursarbetet i Hälsingborg och den 9—11 höll ombudsmannen föredrag och 2 provlektioner i Kristianstad och samlade esperantisterna till ett nattligt möte efter andra dagens arbete.

Den 11 december höll han också sammanträde i Hörby och nästa dag föredrag inför hela Samrealskolan där. Den 12—15 december ägnades Hälsingborg, där en hel del arbete väntade, bl. a. ett högre examensprov och en Luciafest.

Nästa resa gick över Åkarp—Lund—Malmö—Arlöv. Även Malmö hade Luciafest, men ombudsmannens egentliga ärende var att hålla 2 avtalade föredrag och träffa ett antal nya.

Efter besök i Höganäs och Halmstad kunde red. Morariu den 19 dec. återvända hem till Örebro. Här nådde

honom de nedslående rapporterna från Dals Långed, där det dåliga vintervädret lade hinder i vägen för den planerade kursen. Ombudsmannens närmaste resplaner äro följande:

**Mitten av januari:** Dalarne: Falun, Borlänge, Rättvik, Mora, Orsa, Västmanland, möjligen också Sala, Krylbo, Enköping, Västerås och Hallstahammar.

**Jan.-febr.:** Gävle med omnejd. **Februari:** Norrland.

**Mars:** Småland.

### Al ĉiuj estimataj samideanoj,

kiuj bonvolis, pro miaj 50 jaroj kiel kunbatalanto en la esperantistaro, esprimi por mi amikajn sentojn en tiu ĉi pasinta jaro kaj min honori, mi humile kaj sincere dankas, dezirante al ili feliĉon, kuraĝon kaj venkemon por la nova jaro.

Fine de la jaro 1942.

Via Paul Nylén.

## Meddelande från Esperanto-Institutet



### AVLAGDA EXAMINA.

Högre esperantoexamen har avlagts av Karl Blomkvist i Stöckeby och Erik Andersson i Borås. Koran gratulon!

### VARENS EXAMENSSKRIVNINGAR.

Förbered er på att delta i examensskrivningen den 14 mars.

För att få träning i översättningsövningar rekommendera vi "Esperanta Studservo", som nu samlat 331 deltagare. Grammatiska problem och en del av esperantos historia behandlas i "Raporto de la Vigbyholma kurso", pris 2 kr. Dr Szilágyis Kursplan för utbildning av tolkar är också bra, pris 1 kr. Beställes hos Institutet, postgiro 5 15 11.

### 40-JARULO.

Kiel la legantaro scias, ni ne kutimas publikigi notojn pri 40-jaruloj. Sed hodiaŭ ni ne povas ne menci, ke d-ro Karl Söderberg, la respektata kaj amata ĉefo de la Sveda Esperanto-Instituto festis sian 40-jaran naskotagon la 6-an de januaro. La red. gratulas en la nomo de multaj amikoj tra la tuta lando!

### DANKO!

La redaktintoj de la VERDA RAPSODIO esprimas siajn plej sincerajn dankojn al s-ano Erik Lundgren pro lia valora, bela laboro kaj helpe koncerne la titolpaĝon de la libro.

F. Szilágyi, S. A. Jacobsson.

### N o v a j e t o.

Al s-ro Goodes, brita instruisto, kaj lia edzino, nask. Astrid Gustafsson, nuntempe loĝantaj en Argentino, naskiĝis filineto Marianne. Gratulon!

### ESPERANTO-VIVO EN LYON (Francujo).

#### Oni deziras korespondantojn.

Pluraj el niaj gazetoj, ĉu semajnaj aŭ ĉiutagaj daŭre raportas favore pri esperanto. Ili volonte enpresas nian adreson, kaj tio rezultas ofte novajn lernantojn, kiuj enskribiĝas en nia poŝta kurso.

Tiun ĉi jaron, kiel kutime, nia movado, reprezentata de la Lyon'a Universitata Esperanto-Rondo, ricevis standon en la foira palaco. Ĝi estis apud tiuj de Hungarujo, Rumanujo, Finnlando kaj Svedujo. Multege da vizitantoj, multe pli ol dum la pasintaj jaroj vizitis ĝin. Eĉ la lastan tagon ni ne plu havis iun vendotan libron. La rezulto estas, ke multaj personoj eklernas nian lingvon, ĉu per korespondado ĉu parole en diversaj lernejoj. Post kelkaj semajnoj tiuj novaj samideanoj deziras korespondi. Do vi, ĉiulandaj samideanoj, notu mian adreson kaj skribu al mi. Ne forgesu noti vian adreson (tio okazis) tre legeble skribatan, kaj faru simplajn frazojn — ili estas komencantoj. Mi antaŭdankas vin kaj promesas al ĉiuj respon-

Andre Vadrine, instruisto,

2 rue Rüplinger,

Lyon IV, Francujo.

# SVEDA KRONIKO

**KRISTIANSTAD.** Efter vår seger i examenstävlingen (lägre) ha vi hållit oss tämligen lugna på vår kant av esperantofronten, men i oktober gingo vi till attack på ABF:s halvårsmöte, med det resultatet, att mötet beslöt att anordna en föreläsningkurs över det internationella hjälpspråket Esperanto under medverkan av red. T. Morariu. Under november startade vi en nybörjarcirkel i Esperanto på ABF-hemmet och lärarfrågan löstes på så sätt att vi äldre ta var sin lektion.

I början av december kom julrådskan — och Morariu. Vår ombudsman har, på inbjudan av ABF, hållit fyra föreläsningar å Folkets Hus den 2, 3, 9 och 10 dec. enligt följande program: den 2 dec.: "Rumänien, oljekällornas land", den 3 dec.: "En väg till mellanfolkligt samarbete", den 9 dec.: "Det pånyttfödda Turkiet" och den 10 dec.: "Människovännen d:r Zamenhof". Efter varje föreläsning höll d:r Morariu en lektion i Esperanto för nybörjare. Red Morariu kan konsten att rycka åhörarna med sig och är dessutom en god pedagog, varför såväl föredrag som lektioner varit god propaganda för vår rörelse. Hr Morariu har dessutom hållit 6 föredrag med ljusbilder vid högre allmänna läroverket, kommunala flickskolan och för folkskolans högre klasser.


B. J.

**MALMÖ.** 3.11. Antaŭmilita memoro: "La Franca Riviero" estis la temo pri kiu s-ro J. Strönne prelegis. Ege belaj lumbildoj sekvis la interesan paroladon. S-ro F. Rasmusson ĝojigis nin per filmmontrado. Plue okazis piana muziko kaj skandialekta kanto. — 5.12. Aŭkcio. Plenplena salono, multaj varoj, nefalsita kafo kaj bongustaj kukoj. La sukcesplena rezultato sendube estas la merito de s-ro H. Andrén, kiu tre bonhumore gvidis la aŭkcion. — 15.12. Ordinara kunsido kaj Luciofesto kun varia programo. Estis nomataj kandidatoj por diversaj elektoj ĉe la jarkunveno. Ankaŭ estis decidate ke la klubo aĉetu la antaŭe menciitan pianon. Ĉe la kaftrinkado nia "Lucio" alvenis kaj dolĉe kantis. S-ro Morariu dum la vespero vizitis nin kaj laŭtleĝis leterojn kiujn li ricevis de esperantistoj eksterlandaj. Okaze de "La tago de la libro" la reprezentanto por la esperanta eldonejo aranĝis etan ekspozicion.

H-dur.

**VETLANDA esperanta klubo** la 15 de dec. finis la studsezono. Tiam la klubo aranĝis kunestadon en hejma regiona bieno de Bäckседа, kaŭze de Zamenhofa tago disdonis inter la membroj librojn aĉetitajn. Kaftrinkado kaj kanto agordis la amuzan kunestadon. La studrondo rekomencos la daŭrigan kurson novjare.

M-m.



Från Hälsingborgsesperantisternas utställning.



**Örebro Esperanto-Societo** aranĝis ekspozicion en fenestro ĉe la granda placo en Örebro. La bildo montras ĝin rekonstruita en hejmo de esperantisto.


Nia societo aranĝis specialan kunvenon la 1an de decembro. Per gazetaj anoncoj ni alvokis ankaŭ kelkajn interesulojn. S-ro Olov Pontho prelegis esperante pri vojaĝo en Gottland akompane de lumbildoj.

Sekretario.

## HORIZONTALALE:

1. Gardu vin du baroj: ~ kaj dentaro (Proverbaro).
4. Povas konsisti el 500 foliegoj.
7. Belaj rakontoj ~ trans la montoj (Proverbaro).
9. Via vino estas nur ~ abomena acidajo (Fundamento).
10. Esperanto kreskis regule, ~ aŭ kripligante (Zamenhof).
14. En koverto.
15. N-ro 8 en literara vico.
16. Mildan, obtuzan.
17. Kemia simbolo de gasforma elemento.
18. Ĉiu por si, por ĉiuj ~ (Proverbaro).
19. Malnovtempaj skribiloj.
22. ... tial la (tre malmultajn) vortojn kun ~ oni devas lerni kiel simplajn vortojn (Fundamento).

## Ŝlosilvortoj al krucvortenigmo de Bigo.



23. Ne nur en nordo sed ankaŭ en oriento.
24. Malgranda fabela estajo.
25. Hunde blekas.

## VERTIKALE:

2. Havas sian centron en Anglujo.
3. Optika vidiluzio.
5. Hoko kaj kroĉilo.
6. Nigro donas ~ per la dua iro.
8. Sveno.
10. Iktero estas ~ malsano.
11. Kolombume.
12. Admono pri energia kaj daŭra laboro.
13. Ebenoj limigantaj volumenaĵon.
20. En la momento mem, dum kiu ni parolas.
21. ~ ŝlosilo ĉion malfermas (Proverbaro).

Ensendu la solvon antaŭ la 1a de februaro al la red., box 698, Stockholm 1. Libropremioj.

## Kial kaj kiel legi?

Pensoj en "La tago de la libro".

Paco sur la tero — tio estis la deziro al la homaro en la tempo de la Kristnasko jam antaŭ du miljaroj. Ankoraŭ hodiaŭ la alsopirata paco ŝajnas same malproksima. Anstataŭe nin atingas el ĉiuj anguloj de la terglobo sciigoj pri bombitaj urboj, subakvigataj ŝipoj kaj neniigitaj homamasoj, pri rasa malamo, pri persekutoj al tiuj, kiuj alimaniere pensas ol la potenculoj de la hodiaŭa tago.

Hodiaŭ venas sciigoj pri perfortaj doktrinoj anstataŭ pri ama evangelio, venas sciigoj pri mortpafitaj homoj, kies nura peko estis, ke ili amis tion, kion iliaj gepatroj, iliaj prapatroj instruis al ili ami. En la paŝoj de tiuj agoj kreskas malamo kaj venĝemo anstataŭ paco kaj repaciĝo.

Ĉu la reguliga horo venos antaŭ ol venos venontjara Kristnasko? Tiu estas la demando, kiun faras al si milionoj da homoj antaŭ la proksimaj festotagoj. Kiel ajn la terura batalo finiĝos — unu estas certa: la estonteco postulos multon de ni ĉiuj. Ĝuste nun ni staras senpovaj rilate la dramon de la mondo — sed en niaj propraj vicoj, en niaj organizoj, ni povas diligente labori por tie krei atmosferon de solidareco, de korkompreno, kaj tiamaniere kontribui laŭ nia malgranda kapablo por rekonstrui la mondon, por savi la kulturon.

Kulturo kaj libroj apartenas unu al la alia. Se ni ne havus la presitan aŭ la skribitan vorton, nia evoluo estus preskaŭ nebla. Dank' al la libroj ni povas lerni de pasintaj generacioj, de ĝiaj spertoj, de ĝiaj eltrovoj — sed ne nur de la generacioj, kiuj jam pasis, sed ankaŭ de la nuna. La libro estas la kunliganta ĉeno al scio. Anstataŭ lerni per propraj spertoj, ni en kelkaj horoj pere de la libro povas havigi al ni tiun scion, kiun jam havas aliaj homoj. Sed la scio-arbo havas multajn branĉojn, el kiuj kelkaj en si portas bonon, aliaj malbonon.

Oni devas uzi la libron ne nur kiel momentan animan narkotajon, ankaŭ ne kiel nuran distrigilon. Kun kritika vido kaj pripensoj oni devas legi, kaj validas kiel la unua: oni devas lerni de la legitaĵo.

Inter multaj homoj en nia tempo troviĝas granda intereso por sinklerigado. Tiu intereso estas duspeca — unuflanke la intereso de tiuj, kiuj volas al siaj kunfratoj fari la impreson pri propraj kleraj kvalitoj, aliflanke la intereso de tiuj, al kiuj sufiĉas, ke ili por si mem sentas sin kleraj. Por atingi la unuan staton ne estas bezonata granda peno — ofte sufiĉas ioma praktika scio en vivantaj lingvoj, cetere kelkaj malprofundaj, malklaraj frazoj kaj frapvortoj. Sed por la dua stato estas necesa tre peno laboro pri fundamentaj, plej

ofte enuigaj aferoj, kiuj tamen estas necesaj, por ke oni vidu kaŭzan kontinuecon kaj konsekvencon en la lernitaĵo, kaj por ke la studrezulto fariĝu vera scio kaj ne nur senvaloraj frazoj. Bedaŭrinde estas tiel, ke multaj, kiuj deziras altigon de sia klereco, ne sufiĉe klopodas en tiu teda kaj ŝajne senbezona laboro. Ĝi ne donas sufiĉe rapidan, videblan rezulton. Sed oni ne rezignu!

Profesoro Hans Larsson iam en parolado rakontis al la lundaj studentoj pri skania vilaĝano, kiu al siaj bien-servistoj donis tre originalan instrukcion. Se ili en la kampa regiono trovis iun objekton aŭ ilon, apartenantan al la bieno, kaj ili ne tuj havus tempon hejmeniri al la bieno kun ĝi, ili almenaŭ ĵetu la trovitaĵon certan distancon en la direkton al la korto. Tiamaniere la ilo iom post iom revenus al sia loko.

Per tio mi volas diri, ke oni ne estu pesimisma rilate al la ebloj fine trovi siajn ilojn en sia propra korto. Sed pacienco ĉiam estas necesa. Prefere oni volas ĉion en unu sama fojo hejmenporti al sia korto, sed en tio oni neniam sukcesos. Oni devas toleri, ke objekto post objekto venas al la korto, kaj oni devas senti ĝojon por ĉiu tia objekto, kiu venis hejmen. Ne indas atendi tiun tagon, kiam ĉio estas kolektita, ĉar tiu tago neniam venos. Ankaŭ se oni per granda peno estus sukcesinta kolekti kaj hejmenporti ĉion, kion oni vidas kuŝi disigita kaj disŝutita, oni per tio ne atingis la aspiritan celon, ĉar dumtempe oni elkovris ĉiam denove novajn objektojn, kiujn oni devas sammaniere kuntiri. En la penado mem ni devas serĉi nian kontentigon, aŭ pli ĝuste en la direkto de la penado, ne en la preta rezulto, ĉar la rezulto neniam estos tutpreta. Estas ia celo, iu direkto, kiu difinas la specon de la penado kaj naskas ĝiajn impulsojn, sed dumtempe ĝi trapasas sian evoluon kaj estas samtempe forŝovita pli malproksimen. Neniam oni tute

## Lilla propagandaserien.

- |   |      |
|---|------|
| 50 Flygblad "Vad är Esperanto?" .....           | —:50 |
| 10 Brevkort med svensk propagandatext .....     | —:40 |
| 5 Reklamläsk med propagandatext .....           | —:25 |
| 25 SEF:s propagandamärken i 3-färg. ....        | —:65 |
| 100 D:o, grön färg, mindre .....                | —:50 |
| 25 Reklametiketter för tändsticksaskar .....    | —:25 |
| 10 Vykort, äkta fotografi, med esperantotext .. | 1:25 |
| 5 Miniatyresperantoflaggor .....                | —:40 |

Katalogpris Kr. 4:20

Pris för hela serien (inkl. porto) 3.—

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO  
Fack 698, Stockholm 1.



Solvo de la  
**KRUCVORTENIGMO**  
en la nov. numero.

Gajninto fariĝis S-ro  
Jonatan Lönn, brevl.  
695 A, Eksjö.

atingas ĝin. Sed — pro tio oni ne lasu siajn ilojn en la kampo! Ĉiam oni penadu por alporti ilin, paŝon post paŝo, pli kaj pli proksimen al la celo — pli proksimen al la centro — tiel longe kiel oni kapablas.

En nia trorapida kaj maltrankvila tempo oni eble trovas malkonvena admonon zorge apartigi kaj tra-elekti sian literaturprovizon, por ke oni ricevu la plej-eban bonon. Sed, ĉu ne estas tiel, ke oni sentas multe pli da ĝojo kaj utilo de unu nura belkomponita kaj valora libro ol de dek aliaj, kiuj estas malzorge, por ne diri stulte aŭ maldece skribitaj? Ne, ĉiam oni povas pere de la literatura kritiko fari al si opinion pri ia certa verko, sed tamen oni povas, helpe de ĝi, krei al si propran opinion pri la valoro kaj laŭ ĝi trafi la elekton. Se oni tamen maltrafis, kion oni certe tre baldaŭ malkovros, kial tiam daŭrigi nur pro tio, ke "ĉiuj aliaj" legis aŭ legas ĝuste tiun libron? Kial okupiĝi pri tia literaturo, en kiu la verkisto rigardas la objektojn kaj la okazaĵojn, la homojn kaj iliajn ĉirkaŭmondon laŭ maniero, kiu estas al ni malloga aŭ nekomprenebla?

Apenaŭ oni povas en la ĉiutaga vivo eviti konfrontigon kun la ombraj flankoj de la vivo, kun sufero kaj mizero. Kial do ne permesi al si mem tiun ĝojon kaj refreŝigon, kiun bona libro povas doni al ni, kiam ni por tempeto havas okazon forkupli la rapidegon de la ĉiutago? Kian ĝojon oni povas senti, kiam oni pense enpenetras en la medion de la libro, fantasio kunvivas en la homsortoj, vidas la vivon per la okuloj de aliaj, spertas la realaĵojn per la vido de alia homo! Nia propra sperto, nia inklino, nia propra medio kaj nia edukado limigas niajn interesojn, sed en la librotorento ni tamen certe ĉiam trovas ion, kio parolas al nia menso kaj riĉigas nian internan vivon. Sed tiam estas necese legi sen troa rapideco, legi kun pripenso, kaj de tempo al tempo pormomente halti por enpenetri en la enhavon kaj por fari eltrovojn en si mem. Eble tiuj eltrovoj estos por ni ne tro flataj aŭ agrablaj, sed ni ne povas fordisputi, ke kelkfoje estas sanige ekvidi la propran memon sen plibeligo. Kiel ofte oni tiam povas aŭdi la voĉon de sia propra konscienco: "tia vi estas, sed tia vi ne devas esti!" En tiaj okazoj oni eble sentas emon rapidi pluen, ne haltante, ne aŭskultante. Oni volas daŭrigi la legadon por rifuĝi de siaj propraj pensoj. Sed tiaokaze oni saĝe agas, se por kelkaj momentoj oni flankenmetas la libron por serĉi klarecon en si mem. Se oni kapablas en tio, oni trovas, ke multe, kio antaŭe aspektis malhela, malklara, nun ricevas tute alian aspekton.

Ĝuste legata, la libro estas nia plej bona amiko, ofte ĝi donas al ni vundojn sed same ofte sanon.

U r s o.

## Svenska Esperanto-Tidningen

### La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Box 698, Stockholm 1.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris Från 1943: helt år kr. 4:—, Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 10 53 27). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Ĉefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

SVISA ESPERO, oficiala organo de Svisa Esperanto-Societo, estas eldonita kiel mimeografiita bulteno kaj montras, kiel oni en Svisujo tenas la movadon vigla, kvankam la cirkonstancoj estas malfacilaj. Oni preparas printempon land-kunvenon en Ascona dum pasko, por kiu kunveno oni trovis kiel aranĝanton iun ne malpli ol doktoron Edmond Privat.

Inter la laboroj de la svisoj ni speciale trovas interesa la novan eldonon de la germana ŝlosilo "Esperanto-Schlüssel". Ne nur ŝlosil-kolektantoj sed ĉiu sveda esperantisto havas eblecon ricevi la tre utilan, modele presitan libreton por unu respondkuponon en letero al O. Walder, Eigenheim, Romanshorn, Schweiz.

### K O R E S P O N D A D O.

Hristo v. Peev — 9-jara, "V. Levski" 101, Karlovo, Bulgarujo.

Lagerlöf-verko en Engholm-traduko  
— kion pli bonan ni povas deziri aŭ  
imagi en nia Esperantujo?

(Hendrik Adamsson en Inf.  
de Esp. Asoc. de Estonio.)

Ĉu vi legis

## La ringo de la generalo?

alie, mendo jam hodiaŭ.

Prezo 2 kr.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO.

Box 698, Stockholm.

Har Ni prenumererat på Svenska Esperanto-Tidningen?

Om inte, så gör det nu!

Helt år kr. 4:—, halvt år kr. 2:—.

